

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas Claude Gacond kaj Andrée Gacond.

Ni salutas hodiaŭ du britajn aŭdantojn, sinjoron J. Brownlee en Hexam kaj sinjoron F. Blunden en Londono. Tiu lasta aŭdanto konstatinte, ke niaj vesperaj elsendoj estas pli malfacile riceveblaj, ol la meztagaj, skribas :

A.- *« Tion mi facile venkas, ĉar lunde kaj merkrede mi kunportas transporteban radio-ricevilon al la laborejo. »*

Cl.- Tiuj atestoj pri intereso por nia laboro faras, ke anstataŭ paroli antaŭ senviva mikrofono, ni vere havas la impreson, semajnon post semajno, babili kun centoj da simpatiaj geaŭdantoj. Tamen memoru, ke la sola ebleco por ni reale havi kontaktojn kun vi, geaŭdantoj, estas ricevi de tempo al tempo salutvorton.

A.- Sinjoro Blunden petas ankaŭ la promesitan informilon pri la propono por Eŭropa Mona Konvencio farita de la franca Studrondo Lamennais. Ni atentigas la ricevontojn, ke tiu raporto estas franclingve redaktita. Tuj kiam eble aperos esperanta dokumento, ni ĝin resendos al la petintoj el nefrancaj regionoj.

Cl.- Ni revenas hodiaŭ al tiu Mona Konvencio, legante demandojn de germana aŭdanto, sinjoro Oskar Breddermann en Esslingen kaj donante la respondojn de sinjoro Gelly, la sekretario de la Studrondo Lamennais.

A.- Unue sinjoro Breddermann skribas : *« Mi dubas, ke inter aŭtonomaj ŝtatoj, per nura ĝirado de pagoj, la diversaj valutoj povos resti stabilaj. »*

Cl.- La proponata Mona Konvencio estas pli ol nura ĝirado de pagoj. Ni hodiaŭ ne povas refari priskribon pri ĝi. Tiu mona konvencio proponas funkciigon de spez-unuo super-nacia, kiu anstataŭus la oran mezurilon kaj ebligus pli facilan kontrolon de la mona cirkulado en la landoj kaj inter la landoj. Neniam estis asertite, ke la aplikado de tiu mona konvencio kondukus al prez-stabileco. Tio estas alia afero.

A.- Sinjoro Breddermann plue skribas : *„Kiel konate la interna valoro de ĉiu monero en iu ŝtato dependas kaj de la aĉetemo, kiu tikle influigas de politikaj, ekonomiaj aŭ katastrofaj eventoj, kaj de la kvanto de la cirkulantaj moneroj, kompletigata de la ĝirotrafiko. »*

Cl.- Al tiuj diroj sinjoro Gelly respondas : *“La valoro de mono rezultas de la prez-nivelo. Tiu prez-nivelo dependas unuflanke de la sumo de la disdonataj enspezoj : salajroj, pensioj, rentoj, honorarioj..., aliflanke ĝi dependas de la volumo de la ofertataj varoj en la nacia merkato. La valoro de mono rezultas de ekvilibro inter la suma aĉet-povo kaj la suma ofero de varoj kaj servoj. »*

A.- Sinjoro Breddermann poste rakontas, kiel en Germanio estis fiksita la valoro de la mono kaj kiel la valoro de la oro influas la valoron de la mono.

Cl.- *« Mi havas nenion por kontraŭdiri al la konduto de la germana registaro de 1948 ĝis nun, respondas s-ro Gelly. Ĝiaj decidoj estas faritaj en la kadro de la nuna mona reĝimo, kiu estas tiu de la ora mezurilo. Tiom longe, kiam tiu sistemo pluvalidas, la reagoj kaj manipuladoj de kanceliero Erhardt kaj de prezidanto de Gaulle ne ŝajnas al mi kritikeblaj. Mi rapide aldonas, daŭrigas sinjoro Gelly, ke se la Eŭropa Mona Konvencio estus starigita, nek unu, nek la alia tiam cedus al la tento amasigi or-brikojn. Ilia sola kaj ĉefa zorgo estus atenti por unu, ke la aĉetpovo de unu germana marko daŭre samvaloru tiun de unu franca franko dudek kvin centimoj, por la alia, ke la aĉetpovo de unu franca franko dudek kvin centimoj en la*

*franca merkato restu proksimume egala al tiu, kiun posedas unu marko en la germana merkato. La marko same kiel la franko estus definitive liberigitaj de la ora kuratoreco ; tiu metalo ne plu estus privilegia garantiaĵo por la valoro de mono. De tiam la kurzo de tiu metalo fiksiĝus en la merkato, kiel fiksiĝas tiuj pri la kupro, stano aŭ plateno, tio estas ekster ĉia interveno de la centraj bankoj kaj nur laŭ la uz-valoro. Por la oro ni pensu al la bezonoj de la juvelarto, de la kemio kaj industrio.*

A.- Sinjoro Breddermann en la fino de sia interesa letero parolas pri la prez-altiĝo. Li konstatas, ke en ĉiuj landoj la prezoj kaj salajroj konstante altiĝas. Li trovas tion malbona kaj tamen bona kaj sin demandas, kiom longe tiu fenomeno povos daŭri ?

Cl.- Sinjoro Gelly prave skribas, ke prezaltiĝo, en si mem, ĉiam estas plago. Estas atesto pri mona degradado. Por li « *neniam la altiĝo de la aĉetpovo de la aĉetantaro povas esti konsekvenco de la salajra altiĝo. Ordonata malaltiĝo aŭ altiĝo de la prezoj kaj de la salajroj en si mem ĉiam estas malbono, maljustaĵo por kelkaj, iluzio kaj nedaŭra fenomeno – koncerne la avantaĝojn – por la aliaj : la prez-altiĝo nepre postsekvas salajr-altiĝon. La prez-nivelo de la varoj necese estas la konsekvenco de la nivelo de la salajroj. Ĉiam estos tiel en ĉiuj ekonomiaj kaj politikaj reĝimoj. Tio signifas, ke altiĝo de la viv-nivelo de la aĉetantaro neniam povos esti atingita sen malaltiĝo de la prezoj ; tiu malaltiĝo de la prezoj estas fenomeno natura pro la teknika disvolviĝo kaj pro la kreskanta substituo de la artefarita energio al la homa energio. La malaltiĝo de la produkta kosto aŭtomate profitas al ĉiuj aĉetanto sen reduktado de la servataj enspezoj.* »

A.- Tiu diro de sinjoro Gelly estas prava.

Cl.- Jes, certe. Tion ni ĉiuj sentas. Sed ĉar la nuna mona sistemo ne ebligas kontrolon pri la enlandaj monaj situacioj, la registaroj tre malfacile povas interveni kontraŭ la konkuro al la prez-altiĝo. Tiam en ĉiu profesio oni sin defendas, kiel oni povas, petante la necesajn salajr-altiĝojn. Ĉar samtempe la produktaj kostoj malaltiĝas, ni foje kredas, ke altiĝo de nia viv-nivelo estas frukto de la altiĝo de la prezoj. Tio estas iluzio, kiu povas konduki al katastrofaj situacioj.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude Gacond kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-